

Enhavo

- **anoncoj**

anoncoj

Forpasoj de David RICHARDSON kaj Gertrude NOVAK; Kie ni kongresos en 2015?; Cinderella stamps available; Would you like to be a *kontaktulo*?; Novaj varoj en la libroservo

- **Por ĝui universalan lingvon en la estonteco, ni devas certigi, ke ni havos komunan planedon**

de la prezidanto - Orlando E. RAOLA

Ĉu esperantistoj (fakte, ĉu iuj ajn homoj) povas resti neŭtralaj rilate la detruadon de la natura medio?

- **Zendo: pensiga ludo enigma**

ludoj - Russ WILLIAMS

Zendo estas nekutima ludo pri indukta logiko kaj intuicio, iasence luda versio de la scienca metodo por malkovri naturajn leĝojn, aŭ luda versio de trovado kaj solvado de eraroj en komputilaj programoj. Tamen oni tute ne devas esti profesia sciencisto aŭ programisto por ĝui Zendon! Oni nur bezonas ĝui solvi enigmojn.

- **Dua recenzo de *The Universal Language***

kino - Renato CORSETTI

“La filmo povas konvinki homojn lerni Esperanton pli ol aliaj verbaj materialoj, kiujn ni produktis kaj produktas. Ĝi estas realisma (ekzemple pri la rolo de la angla lingvo) sed puŝas homojn aliĝi al la ‘plibonigantoj de la mondo pro la plezuro plibonigi la mondon’.”

- **Mia malkovro de Japanujo (*kvina parto*)**

vojaĝe tra la mondo - Ĵenja AMIS

Ĵenja daŭrigas siajn aventurojn en Japanujo, unue al Obama (ne tiu, alia!) en Hokuriku, poste al Fukui kaj terkultivista komunumo Hoeiĝuku, kaj revene al Kioto, kie Ĵenja fariĝas japanino...

- **Pri diferencialaj ekvacioj**

scienco - Barry FRIEDMAN

Diferencialaj ekvacioj estas matematika lingvo en kiu la naturo esprimas siajn leĝojn.

- **Nenian ideon**

du jaroj kamerune - Joshua MORRIS

En Usono, se oni ne estas kvin minutojn frua, oni jam malfruas kvin minutojn. En Kameruno, se oni estas kvin minutojn malfrua, oni ankoraŭ trofruas almenaŭ unu horon.

- **“Estimulo”**

senintenca esperantaĵo?

Membro Tim WESTOVER sendis tiun ĉi foton de estimemaj vinboteloj el Argentino. Supozeble ili estimas siajn trinkontojn. Aŭ ĉu ili simple timas la korelativan finaĵon *-es*?

ISSN: 1056-0297Usona

Esperantisto

Dumonata bulteno de Esperanto-USA • Numero 2013:3 (maj-jun)

American Esperantist

Bi-monthly bulletin of Esperanto-USA • 2013:3 (may-jun)



Ĉi-numere:

- Revenas la aventuroj de Joshua en du jaroj kamerune
- Alia opinio pri *The Universal Language*
- Ludoj: Zendo
- ...kaj multe pli!

Vojaĝe: Post vizito al Obama (la urbo, ne la prezidento) Ĵenja fariĝas japanino!

- **Mia malkovro de Japanujo (*kvina parto*)**

Forpasoj

David RICHARDSON

David RICHARDSON, naskita en 1926, forpasis la 10-an de Decembro, 2012 en Vaŝingtonio. Inter liaj diversaj kaj buntaj karieroj li estis inĝeniero, radioanoncisto, diskestro, pionira televidisto, soldato en la dua mondmilito, lingvisto, kaj verkisto. Li iam estis prezidanto de Esperanto-USA, kaj li aŭtoris la lernolibron por anglalingvanoj *Esperanto: Learning and Using the International Language* [<http://goo.gl/Ek5t9>]. Plej lastatempe li tradukis la faman *Rubaját de Omar Kajjám* [<http://goo.gl/LfZ8e>] kaj verkis anglalingvan biografion pri Richard GEOGHEGAN, la viro kiu enkondukis Esperanton en Nordamerikon. (Legu lian lastatempnan artikolon pri Geoghegan en n-ro 2010:3.)



(Persona noto: same kiel ĝi jam faris por multaj aliaj usonanoj, la lernolibro de David RICHARDSON ludis fundamentan rolon por mi kiam mi komencis studi Esperanton. —Red.)

Gertrude NOVAK

D-ino Gertrude NOVAK, naskita en 1920, forpasis en Ĉikago la 21-an de Majo 2013. Ŝi estis medicina patologo kiu edukis plurajn generaciojn de kuracistoj. Dum multaj jaroj ŝi laboris ĉe la universitato Rush Medical University kaj laste en la hospitalo Stroger en Ĉikago. Ŝi estis senlaca volontulo kiu aktivis en multaj kampoj. Kiel flua esperantistino ŝi vigle agadis en la movado. Ŝi vojaĝis tutmonde por amikiĝi kun ĉiuj, i.a. en Afriko kaj Sudameriko. Ŝi estis plurjara Delegito de UEA kaj Prezidantino (1994-1996) kaj Sekretario (2006-2013) de la Esperanto-Societo de Ĉikago.



(Dankon al Les KORDYLEWSKI pro la informo.)

Kie ni kongresos en la jaro 2015?

La Kongresa Komitato nun povas informi ĉiujn, ke en 2014, la Landa Kongreso de Esperanto-USA (kaj ankaŭ de la Kanada Esperanto-Asocio) okazos en Viktorio, Brita Kolumbio. La UK okazos en Bonaero, Argentino de la 26-a de Julio ĝis la 2-a de Aŭgusto kaj la ILEI-konferenco en Montevideo, Urugvajo okazos dum la antaŭa semajno, de la 19-a ĝis la 25-a de Julio, 2014.

Sed kie la Landa Kongreso de Esperanto-USA okazos en la jaro 2015? La urbo kiu gastigos la kongreson havos grandan influon pri la datoj de la kongreso, sed ni ne volas okazigi ĝin en la sama periodo kiam la UK okazos, kutime je la fino de Julio.

La Kongresa Komitato nun serĉas lokon. Ni esperas baldaŭ trovi lokon por ke ni povu anonci tion ĉe la kongreso en Raleigh. Se vi volus okazigi la Landan Kongreson de 2015 en via urbo, bonvolu kontakti min baldaŭ.

— Ronald GLOSSOP, *Estro de la Kongresa Komitato*, <rglossop@mindspring.com>.

“Cinderella Stamps” available

Mr. Robert Brown is selling a large collection of Esperanto “cinderella stamps” (stamps not printed by a government authority). These stamps are part of a collection owned by Robert Du Bois, a well-known collector of such stamps. For more information, call Robert Brown at 610-469-2758.

— Bill Harris, *Director, Central Office*.

Would you like to be a *kontaktulo*?

Every day, E-USA receives requests for information, and we send a package of information to the street address provided. If a requester elects to be contacted by a nearby Esperantist, our computer system finds the nearest E-USA member who has agreed to be a “*kontaktulo*”. The *kontaktulo* is then sent information about the requester (name, street address, email address).

The *kontaktulo* can then send an email to the requester, introducing himself/herself and providing information about local groups, meetups, or local

news. As a result, the requester will know that there is at least one Esperantist nearby.

Other information:

- Your introductory email to the requester should be in English, although you can offer to switch to Esperanto in future correspondence.
- Your name and email is not sent to the requester by the E-USA office. The decision to contact the requester is up to you.
- Occasionally a request comes in on paper, without an email address. Contact would have to be done via postal mail. Again, the decision to contact the requester is up to you.
- The system assumes that “nearby” means within 100 miles. Requesters outside that area will not be referred to you.
- If you are running a state-wide Esperanto group, you can ask that the 100 mile limitation be lifted, and get information about any requester in your state.

If you would like to be a *kontaktulo*, please send your request to <eusa@esperanto-usa.org>.

— Bill Harris, Director, Centra Oficejo

Novaj varoj en la libroservo

LA AVENTUROJ DE ŜERLOKO HOLMSO

A. Conan DOYLE

Tradukis István ERTL, Hoss
FIROOZNA, Reinhard FÖSSMEIER,
Edmund Grimley EVANS, Paul
GUBBINS, Sten JOHANSSON, Trevor
STEELE kaj Russ WILLIAMS.

Antaŭparolo de Aleksander
KORĴENKOV. La originala libro

(angle: *The Adventures of Sherlock Holmes*) estas mondfama detektiv-romano. Temas pri kelkaj noveloj, komenciĝas per *Skandalo en Bohemujo* kaj finiĝas per *La Sangofagoj*. Malmola bindaĵo. 246 p. 2013. Rusujo. **\$25.90** (ligilo) [<http://goo.gl/Wsv1Y>]



LA HOBITO

J. R. R. TOLKIEN

Tradukis Christopher GLEDHILL,
poeziaĵojn tradukis William AULD.

Ne nova, sed nove havebla post
freŝa represo de la dua eldono.

2005. 224 p. Mola bindaĵo.

Rusujo. **\$23.30** (ligilo)

[<http://goo.gl/wfToI>]



MY LITTLE ESPERANTO GRAMMAR

Peter WEIDE

An introductory grammar in
English, with Esperanto examples.

Just enough grammar for the
beginner to grasp while

concentrating on vocabulary and
pronunciation. Paperback. 29 p.

2013. Denmark. **\$8.50** (ligilo)

[<http://goo.gl/Z1EUG>]



Used books

- **INTERLINGUA - A PRIME VISTA**

By Alexander Gode. Good condition. Hardcover. 80 pages. 1954. A course in Interlingua. The text is in Interlingua with many drawings for explanation and clarification. \$25.00

- **JUNAJ TREZOR-SERĈANTOJ, LA**

De J. H. SULLIVAN. Bona stato. Mola bindaĵo. 24 paĝoj. 1968. A short story for young beginners. \$2.00

- **LONGA MARŜO, LA**

De J. H. SULLIVAN. Bona stato. Mola bindaĵo. 24 paĝoj. 1968. A short story for young beginners. \$2.00

- **KOMPLETA GRAMATIKO KAJ
VORTFARADO DE ESPERANTO**

De Fruictier. Ne tre bona stato. Mola bindaĵo. 187 paĝoj. 1930. Aŭtoro de *Esperanta sintakso* kaj *La esperanta vortfarado*. \$10.00

- **POCKET ESPERANTO DICTIONARY**

By Andrew McLinen. Good condition. Paperback. 392 pages. 1992. \$15.00

- **POPULATIONES IN DEVELOPPAMENTO**

By Hannes Hyrenius. Good condition.
Paperback. 112 pages. 1972. Demographic
research. Text is in Interlingua. \$15.00

- **SANKTA BIBLIO, LA**

Bona stato. Malmola bindaĵo. 220 paĝoj. 1926.
La Malnovan Testamenton tradukis Zamenhof.
La Novan Testamenton tradukis la Brita kaj
Alilanda Biblia Societo. \$15.00

- **TEACH YOURSELF DICTIONARY**

By J. C. Wells. Fair condition. Paperback. 419
pages. 1985. Dictionary for the Teach Yourself
series. (This is the original dictionary by John
Wells. His later version, expanded and revised,
is now available as a new book.) \$12.00

- **TEACH YOURSELF ESPERANTO**

By Cresswell and Hartley. Good condition.
Hardcover. 205 pages. 1959. \$15.00

- **TRAVELLER'S ESPERANTO MANUAL
OF CONVERSATION**

By J. C. O'Conner. Good condition. Paperback.
78 pages. 1910. Many phrases in (British)
English and Esperanto. Also tables for money
conversion, a "washing list", and a small

dictionary. \$15.00

- **TRI HOMOJ EN BOATO**

De Jerome K. JEROME. Bona stato. Mola
bindaĵo. 256 paĝoj. 1934. \$4.00

- **TUTA ESPERANTO, LA**

De Henrik SEPPIK. Ne tre bona stato. Mola
bindaĵo. 181 paĝoj. 1987. Taŭga por tiuj, kiuj
jam legis *Step by Step in Esperanto* de Butler.
\$9.00

- **VIVO DE NIA SINJORO JESUO, LA**

De Charles DICKENS. Bona stato. Malmola
bindaĵo. 118 paĝoj. 1934. *Life of our Lord*
tradukita de Montagu BUTLER. \$100.00

- **VIVO DE ZAMENHOF**

De Edmond PRIVAT. Bona stato. Malmola
bindaĵo. 109 paĝoj. 1923. \$20.00

Order from **Esperanto-USA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530**, or online [<http://esperanto-usa.org/retbutiko>]. If a title is out of stock, the online bookstore can notify you by email when it becomes available again. Due to fluctuations in the value of the dollar, all prices are subject to change without notice.

Por ĝui universalan lingvon en la estonteco, ni devas certigi, ke ni havos komunan planedon

Orlando E. RAOLA

Ĉu esperantistoj (fakte, ĉu iuj ajn homoj) povas resti neŭtralaj rilate la detruadon de la natura medio?

Ni, esperantistoj, kuraĝe kaj fiere partoprenas la neŭtralan movadon dum pli ol jarcento. La ideo, ke la esperanta movado restu neŭtrala rilate aferojn politikajn kaj soci-ekonomiajn estis ambaŭ necesa kaj utila dum la pasintaj 125 jaroj. Ĝi permesis daŭrigi la agadon cele al kunkreado kaj disvastigo de tiu ĉi mirinda komunikilo, en landoj kaj mondregionoj sub la plej diversaj socipolitikaj sistemoj.

Tiu neŭtraleco estas forte enradikiĝinta en niaj bazaj dokumentoj. En la statuto de UEA (Artikolo 5):

UEA estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, sekso, religio, kaj sociaj kaj politikaj problemoj, kun escepto de la lingva problemo en internaciaj rilatoj. Tiu neŭtraleco signifas, ke UEA ne prenas starpunkton pri la koncernaj problemoj. Bonaj internaciaj rilatoj kaj la respekto de la homaj rajtoj, tiaj, kiaj ili estas difinitaj en la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj aliaj internacie rekonataj instrumentoj estas por la laboro de UEA esencaj kondiĉoj.

La statuto de nia landa asocio fidele fiksas similan precepton. El la antaŭparolo: “La Asocio estas kaj restos porĉiam neŭtrala rilate religion, politikon kaj soci-ekonomian teorion.”

Kompreneble tra la historio estiĝis konfliktoj kaj internaj bataloj, ĉar ne sufiĉas formuli la ideon, oni devis interpreti kaj apliki ĝin en plej diversaj cirkonstancoj. Ankaŭ okazis, ke sufiĉe forta kaj granda grupo de esperantistoj decidis, ke ili ne povis funkcii efike kaj inspire kadre de la supre detaligita neŭtraleco, kaj tiel estiĝis la laborista esperanto-movado kaj ties ĉefa organizaĵo SAT [*Sennacieca Asocio Tutmonda*]. Sed en la nuna jarcento, specife post la fino de la malvarma milito kaj la falo de la berlina muro, en mondo iom malpli dispolarigita,

indas de tempo al tempo reekzameni la bazajn ideojn de nia neŭtraleco, speciale kontraŭ la fono de la novaj realoj kiuj estiĝis, preskaŭ neantaŭvideble.

Antaŭnelonge mi spektis usonan dokumentan filmon. La filmo detale priskribas la vivon de usona studento dum la lastaj kvin jaroj. Tiu junulo elektis la vojon de pacama civila malobeado por defii la tutan juran sistemon de nia lando kaj per tiu ago, sukcesis malhelpi la privatigon de grandaj publikaj terpecoj kie la aĉetuntoj volis esplori kaj trabori la grundon por elfosi petrolon. Malgraŭ tio, ke posta esploro fare de la registaraj instancoj deklaris la teraŭkcion kontraŭleĝa — ĉar mankis ĝisdetala analizo de ĝiaj konsekvencoj por la naturmedio — la sama registaro tamen daŭre akuzis la junulon pri ĝenado de la vendoprocezo kaj mensogado al la registaraj instancoj. Ĵurio trovis lin kulpa kaj li pasigis dudek unu monatojn en federacia malliberejo.

Li elkarceriĝis antaŭ kelkaj monatoj. Inter lia ago kaj la momento kiam li estis malliberigita, tiu junulo trakrozis la tutan landon plurfoje, klopodante klarigi ke lia “kontraŭleĝa ago” havis la celon protekti tiun belegan landon por la estontaj generacioj, ĉar li multe timis, ke daŭra ekspluatado de fosiliaj brulaĵoj troveblaj sub tiuj montoj kaj valoj daŭre kondukos al pliigo de la koncentriteco de karbona dioksido en la atmosfero kaj al neinvertigebla ŝanĝiĝo de la vetero en nia planedo.

Tiu katastrofo, kiun multaj sciencistoj jam opinias neevitebla, kondukus nin al planedo tiom mizera, ke la ideo de internacia komunikilo, homaj interrilatoj kaj kunfratiga paco estos tute fremdaj sur ĝi. Spektinte la filmon, mi cerbumis: ĉu la movado celanta al protektado de la planedo kontraŭ klimata ŝanĝiĝo kaj ĝiaj konsekvencoj povas iel esti ligita kun la celoj de esperantismo kaj la klopodoj de la esperanto-movado cele al pli justa monda komunika ordo?

En la filmo oni ofte mencias kaj intervjuas scienciston apartenantan al la Interregistara Spertularo pri Klimata Ŝanĝiĝo. Tiu organizaĵo ricevis la Nobel-pacpremion en 2007 kundividitan kun la usona eks-vicprezidento Al GORE. Kiel evidentas el la nomo de la organizaĵo, temas pri afero inter la registaroj, kaj ĝi okazas en pluraj lingvoj: angla, franca, ĉina, rusa, araba kaj hispana. Sed se la komuna strebado cele al haltigo kaj inversigo de la klimataj ŝanĝoj restos nur ĉe la nivelo de registaroj, ni, la teranoj, ne havas esperon pri estonteco. Kaj interalie, ni povas de nun forgesi pri internacia lingvo, ĉar ne estos komuna planedo loĝebla por uzi kaj ĝui. La movado celanta klimatan justecon devas esti movado de la individuaj unuopuloj en ĉiuj landoj de la mondo.


Tial oni povas facile trovi rektan konekton inter la celoj de esperantistoj kaj la celoj de la movado por klimata justeco. Ni povas provizi alternativan vojon por komunikigo inter ĉiuj homoj kiuj interesiĝas pri vivipova estonteco por la planedo Tero. Ĉu temas nur pri “faka agado”? Ne, tiu ĉi problemo tuŝas ĉiujn fakojn kaj tavolojn de la socio. Ĉu temas pri politika aŭ soci-ekonomia afero? Ne. Senrigarde de via politika vidpunkto kaj de via ekonomia aŭ socia pensmaniero, vi estos same tuŝita de la aliigo de la klimato sur la planedo. Temas pri vere “neŭtrala kaj internacia fenomeno”.

Oni ankaŭ povus sin demandi, kial nun, kial ni ne engaĝiĝis antaŭe? Mi povus respondi, ĉar nur lastatempe akumuliĝis sufiĉe da scienca evidenteco pri la pritraktataj problemoj, ĝi estas vera problemo de la nuntempo, kiu tute ne ekzistis, aŭ estis sufiĉe

malgrava, en pasintaj tempoj.

Adaptiĝi aŭ pereji – ĉu nur tiujn eblecojn ni havas? Mi celas pensigi la legantojn pri tiu ĉi problemo. Mi ne intencas starigi tujan statutan ŝanĝon por ke ni fariĝu parto de “Pacama Leviĝo” (organizaĵo pritraktita en la filmo, kiu estiĝis por laborado cele al klimata justeco). Mi nur celas iom maltrankviligi vin kaj pensigi vin: Kiel Esperanto povas kontribui al kunlaborado internacia sur tiu ĉi kampo, kiu evidente fariĝas strebo por nia pluvivado sur la bela blu-verda planedo Tero?

Venontan monaton ni kongresos unue en Raleigh, Norda Karolino por la Landa Kongreso (5-8 Julio) kaj poste en Rejkjaviko, Islando por la 98-a Universala Kongreso (20-27 Julio). Eble vi pretas enketi inter viaj samkongresanoj: “Kion vi pensas pri la uzo kaj valoro de Esperanto en la monda movado celanta la protektadon de la natura medio, la plivastigon de nepoluaj energifontoj, la certigon, ke ni kaj niaj idoj havos planedon en la estonteco por uzi internacian lingvon en homfratiga komunikado?” Ĝis!



Orlando E. RAOLA


Orlando estas prezidanto de Esperanto-USA. Li loĝas en Greenbrae, Kalifornio.

[<coraola@gmail.com>](mailto:coraola@gmail.com)

Zendo: pensiga ludo enigma

Russ WILLIAMS

La ludo *Zendo* de Kory HEATH estas interesa nekutima ludo pri indukta logiko kaj intuicio, iasence luda versio de la scienca metodo por malkovri naturajn leĝojn, aŭ luda versio de trovado kaj solvado de eraroj en komputilaj programoj. Tamen oni tute ne devas esti profesia sciencisto aŭ programisto por ĝui Zendon! Oni nur bezonas ĝui solvi enigmojn.



Ĝi tre bonas por esperantaj aranĝoj, ĉar la ludoreguloj simplas kaj Zendo ne postulas strategian talenton, sed nur la kapablon rezoni kaj ĝui la “aha-efikon” de malkovro! Ĝi estas do ankaŭ bone eduka por infanoj en klasĉambroj, tamen ankaŭ tute interesa por plenkreskuloj. Krome eblas ludi mallonge aŭ longe, laŭ prefero kaj situacio.

Cetera avantaĝo estas, ke Zendo ludeblas per tre

diversaj aĵoj: moneroj; diverskoloraj kuboj; literoj aŭ ciferoj aŭ aliaj simboloj skribitaj sur papero; mien-simboloj en interreta forumo; diverskoloraj diversgrandaj plastaj *Looney*-piramidoj vendataj de *Looney Labs* (la originala tradicia maniero ludi); ktp. El tiuj luderoj ludantoj kreas *koanojn* (t.e. grupoj/aranĝoj de la elementoj). Ekzemple, se ni ludas per skribitaj literoj, ekzemplaj koanoj povus esti *A*, *KOANO*, *WXYZ*, *ĈĜĤ*... Se ni ludas per moneroj, ekzemplaj koanoj povus esti 1-cendo, du 5-cendoj, 5-cendo + 10-cendo...

Unu homo estas la *Mastro*, kiu komence elpensas ian *sekretan regulon*, kiu malambigue determinas ĉu ajna koano “havas la budhan econ” aŭ ne. (Ekzempla simpla regulo: “Koano havas la budhan econ, se ĝi enhavas almenaŭ 2 elementojn de la sama speco.”)

La Mastro donas unu komencan ekzemplon konforman al la regulo (ekzemple *AAB*), kaj unu komencan ekzemplon nekonforman al la regulo (ekzemple *ABC*). Nun la ceteraj ludantoj laŭvice provas malkovri la regulon per kreado de novaj koanoj, tiel esplorante aŭ testante siajn hipotezojn pri la regulo, ĉar la Mastro respondas al ĉiu proponita nova koano per informo, ĉu ĝi havas la budhan econ aŭ ne.

Do Zendo estas multe pli interesa formo de la tradicia “ĉu-ludo” (“20 Demandoj”). Anstataŭ provi malkovri unu specifan konkretan *objekton* per demandoj pri la sekreta objekto (“Ĉu ĝi estas besto?” “Ĉu ĝi havas kvar krurojn?” ktp.), oni provas malkovri ĝeneralan *regulon*, kiu *klasifikas objektojn*. La ludantoj, anstataŭ demandi pri unu sekreta objekto, mem kreas objektojn kaj demandas, ĉu ili konformas al la sekreta regulo.

Konkrete ekzemplo de ludado kun moneroj

Imagu, ke ni ludas per usonaj moneroj. Komence la Mastro elpensas sian sekretan regulon kaj elmetas (ekzemple) unu 1-cendon kaj diras “Tio havas la

budhan econ” kaj elmetas du 5-cendojn kaj diras “Tio ne havas la budhan econ”.

Tiam Mario elmetas unu 1-cendon kaj unu 5-cendon kaj demandas, “Mastro, ĉu tio havas la budhan econ?”

La Mastro respondas “Jes” kaj movas la 1+5-cendojn apud la 1-cendon.

Tiam Petro elmetas du 5-cendojn kaj unu 10-cendon kaj demandas, “Mastro, ĉu tio havas la budhan econ?”

La Mastro respondas “Ne” kaj movas la 5+10-cendojn apud la 5+5-cendojn:

Kun budha eco: 1, 1+5

Sen budha eco: 5+5, 5+5+10

Eble nun Petro ekhavas ideon kaj provas diveni: “Mastro, ĉu bona koano devas havi 1-cendan moneron?”

La Mastro respondas, “Gratulon, mia lernanto, vi sukcesis!” (Tio estas ekzemplo de sufiĉe simpla facila regulo!)

Sed kompreneble Petro povus erari. Se ludanto divenas malprave, tiam la Mastro devas doni kontraŭekzemplon, kiu pruvas, ke la proponita regulo ne ĝustas.

Ekzemple, se la ekzempla propono de Petro malĝustas, la Mastro respondas “Ne; jen kontraŭekzemplo” kaj elmetas koanon, kiu *aŭ* havas 1-cendon tamen ne bonas, *aŭ* ne havas 1-cendon tamen bonas. (Do la kontraŭekzemplo povus esti pozitiva aŭ negativa.) Eble la Mastro elmetas 1+10 kaj diras “Jen, tiu koano havas 1-cendon, tamen ĝi ne havas la budhan econ!”:

Kun budha eco: 1, 1+5

Sen budha eco: 5+5, 5+5+10, 1+10

Do la ludado daŭros, ĝis iu sukcese eltrovos la kaŝitan regulon. (Se nun estus via vico, kian koanon vi elmetus? Ĉu vi havas ideon pri eblaj reguloj?)

Konkreta ekzemplo de ludado kun nur vortoj

Uzante vortojn kiel “koanojn”, eblas ludi sen fizikaj

elementoj, sed nur skribe — sur papero aŭ nigra tabulo aŭ retroŝte... aŭ eĉ nur voĉe, se vi havas bonan memorkapablon!

Komence la Mastro elpensas sian regulon kaj diras (ekzemple), ke *neĝo* havas la budhan econ sed *pluvo* ne havas ĝin.

Tiam Mario demandas, “Mastro, ĉu *suno* havas la budhan econ?” kaj la Mastro respondas, ke ne.

Tiam Petro demandas, “Mastro, ĉu *ĉapelo* havas la budhan econ?” kaj la Mastro respondas, ke jes.

Estas nun via vico. Kiun koanon vi proponus? Ĉu vi ekhavas ideon pri la regulo?

Eble vi ekpensas, “Hmm, *neĝo* kaj *ĉapelo* bonas, sed *pluvo* kaj *suno* ne. Eble la koanoj kun ĉapelitaj literoj havas la budhan econ.” Do vi provas alian koanon kun alia ĉapelita litero: *aŭto*.

La Mastro diras, kiel vi supozis, ke *aŭto* havas la budhan econ. Do vi divenas tiel: “Mastro, ĉu koano havas la budhan econ se ĝi havas ĉapelitan literon?”

Sed vi malprave divenis. Do la Mastro diras, ekzemple, “Bona provo, sed konsideru la jenan ekzemplon: la koano *kaŭĉuko* havas ĉapelitan literon, tamen ĝi ne havas la budhan econ.”

Kaj do la ludado daŭras. Eble nun vi ekpensas pri la *kvanto* de ĉapelitaj literoj: eble devas esti precize unu, do *kaŭĉuko* havas tro multajn! Aŭ eble estas suspektinde, ke la litero *u* aperas en ĉiuj malbonaj koanoj:

Kun budha eco: *neĝo*, *ĉapelo*, *aŭto*

Sen budha eco: *pluvo*, *suno*, *kaŭĉuko*

Kian koanon vi proponus nun?

Vera Zendo: divenŝtonoj

Nu, vi jam scias sufiĉe multe por ĝui la ludadon de Zendo neformale aŭ kun nespertaj ludantoj. (Eĉ eblas ludi kiel kunlabora teamo, interparolante pri hipotezoj kaj ideoj, se la grupo estas tute malkonkurema.)

Sed por ludantoj, kiuj volas ludi pli konkure, la plena vera ludo uzas tiel-nomatajn “diven-ŝtonojn”.

Komence, ĉiu ludanto havas po unu ŝtonon. Por

provi diveni la regulon dum via vico, necesas pagi unu ŝtonon. Tio kaŭzas, ke homoj ne simple konstante divenadu kaj ricevadu kontraŭekzemplojn. Vi devas saĝe decidi, kiam indas diveni, ĉar ĉiu diveno kostas al vi ŝtonon!

Por akiri pli multajn divenŝtonojn, kiam vi proponas novan koanon, anstataŭ simple demandi la Mastro, ĉu via nova koano havas la budhan econ, vi rajtas deklari “*Mondo!*”, kio signifas, ke ĉiuj ludantoj samtempe sekrete indikas, ĉu ili pensas, ke la nova koano havas la budhan econ aŭ ne. (Por fari tion, konvenas uzi blankajn kaj nigrajn voĉdonajn ŝtonojn, ekzemple go-ŝtonojn, el kiuj ĉiuj sekrete metas po unu en la mano kaj samtempe malkaŝos.) La Mastro tiam indikas la rezulton, kaj ludantoj, kiuj prave antaŭdiris, ricevas po unu diven-ŝtonon. Tiel, se vi pensas, ke vi havas bonan hipotezon pri la regulo, vi povas gajni rajton diveni.

Konsiloj

1. Ludado per fizikaj aĵoj (moneroj, kuboj, ĵetonoj, piramidoj, ktp.) anstataŭ nur skribe estas plaĉa. Sed havu sufiĉe multajn elementojn. Mi rekomendas almenaŭ 5, prefere 10 aŭ pli, de ĉiu speco de elemento. Ekzemple se vi ludas per usonaj moneroj, havu almenaŭ 10 da 1-, 5-, 10-, 25-cendaj moneroj. Alie estas problemo, ke ludanto volas konstrui novan koanon, sed mankas elementoj. Mi mem aĉetis multajn etajn diverskolorajn lignajn kubon kaj ŝatas ludi per ili. Se necesas, oni povas malkonstrui iujn koanojn laŭ komuna interkonsento por ekhavi pli da elementoj dum ludado.
2. Konsentu komence ĉu nur la grupo de elementoj gravas aŭ ĉu ankaŭ preciza fizika aranĝo gravas. Por simpligi aferojn, mi rekomendas, ke nur la grupoj gravas, *ne* la preciza aranĝo de la elementoj. Kial? Ĉar estas fizike konvene, se la precizaj pozicioj de koanaj elementoj ne gravas, por ke la Mastro povu ŝovi koanojn al unu tabla flanko aŭ la alia por indiki ĉu ili havas la budhan econ aŭ ne, kaj homoj povas facile removi kaj rearanĝi koanojn kiel unuojn por cerbumi. (Alternative oni povas meti blankan aŭ nigran ŝtonon apud ĉiu koano tie, kie ĝi staras, por indiki ĉu ĝi havas la budhan econ.) Se precizaj

pozicioj gravas, estas risko de tro komplikaj reguloj kaj ĝenaj fizike ambiguaj koanoj (“Ruĝa disko devas almenaŭ duone, sed ne plene, kovri verdan diskon...”, “Hmm, ĉu tiu disko plene kovras la suban diskon aŭ ne? Malfacilas distingi...”)

3. La specifa *vortumado* de la regulo ne gravas, nur la *signifo* de la regulo gravas. Se la Mastro pensas “Estas malpli da ruĝaj kuboj ol verdaj kuboj” kaj ludanto proponas “La kvanto da verdaj kuboj estas pli granda ol la kvanto da ruĝaj”, tio estas ĝusta diveno, ĉar la *signifoj* samas.
4. Memoru, ke *la Mastro ne konkuras kontraŭ la ludantoj*. La celo de la Mastro *ne* estas krei malfacilegan nesolveblan regulon, sed simple doni plaĉan mensan ekzercadon al la ludantoj. Depende de la preferoj de la ludantoj, bona regulo postulos nur kelkajn koano-provojn por solvi, aŭ duonan horon da cerbumado, sed ĉiukaze, la regulo estu simpla, eleganta, solvebla kaj ne tro bizare komplikita. (Se vi volas uzi regulon kiel “Bona koano devas havi priman numeron de verdaj pecoj, krom se estas para nombro de malgrandaj pecoj, kio kaŭzas ke la kvanto de ruĝaj pecoj estu precize duoble pli multa ol la kvanto de mezgrandaj flavaj pecoj, krom se ne ekzistas flavaj pecoj, en kiu kazo la sumo de verdaj plus blua devas esti Fibonacci-numero”... nu, mi konsilas al vi ne uzi tian regulon!)

Jen kelkaj bonaj ekzemploj de reguloj (por diversspecaj ludelementoj), pli-malpli en ordo de plej facila ĝis iom malpli facila:

- o La litero *e* devas aperi.
- o Neniu elemento povas aperi pli ol unu fojon.
- o La tuta kvanto da elementoj devas esti para nombro.
- o Devas esti pli multaj kuboj ruĝaj ol verdaj.
- o La kvanto da ruĝaj diskaj devas egali la

kvanton da verdaj diskoj.

- La kvanto da ruĝaj piramidoj devas egali la kvanton de grandaj piramidoj.
 - Se koano enhavas ruĝan piramidon, ĝi devas enhavi ankaŭ grandan piramidon.
5. La regulo de la Mastro devus esti malambigua kaj devus dependi nur de la koano mem, ne de eksteraj cirkonstancoj. Do ne estu trukaj reguloj, kiuj dependas de tio, ĉu iu aranĝis koanon per la maldekstra aŭ dekstra mano; aŭ ĉu ĝi havas komunan elementon kun la antaŭa koano; aŭ ĉu viro aŭ virino proponis ĝin; aŭ de la preciza horloĝa tempo, kiam oni metis la koanon; kaj tiel plu. Tiaj trukoj ne estas laŭ la spirito de la ludo. Imagu, ke vi ne observas la konstruadon de la koano nek aliajn koanojn, kaj vi simple eniras la ĉambron kaj vidas nur tiun koanon; la regulo devus dependi nur de tiu sola koano mem, kiun vi vidas, sen scio pri la cirkonstancoj de la konstruado de la koano.
6. Fojfoje ludanto erare proponas regulon, kiu jam havas kontraŭekzemplon inter la jam elmetitaj koanoj. Tiuokaze la diveno simple ne estu valida, kaj estu nenia puno aŭ alia efiko.

Ligoj al pliaj informoj

- Zendo ĉe BoardGameGeek [<http://boardgamegeek.com/boardgame/6830/zendo>], kie iuj homoj ludadas en la forumo per mien-simboloj.
- Bona pensiga anglalingva recenzo “Zendo as a tool for teaching the scientific method” [<http://boardgamegeek.com/thread/154012/>]
- Plenaj reguloj kaj informoj de la aŭtoro Kory HEATH [<http://www.koryheath.com/games/zendo/>]
- Looney Labs [<http://www.looneylabs.com/looney-pyramids>]



Russ WILLIAMS

Antaŭe de Aŭstino, Teksaso, Russ loĝas en Vroclavo, Polujo kun sia edzino Anna SKUDLARSKA. Ili esperantumas kaj tabulludas obsede.

<cxiomortas@gmail.com>

Dua recenzo de *The Universal Language*

Renato CORSETTI

Ĵus pasintnumere ni aperigis recenzon pri tiu ĉi filmo, sed subite (kaj eble reage al ĝi) alvenis alia. Renato CORSETTI estas eksa prezidanto de UEA kaj mem intervjuigis en la filmo. —Red.

Mia patrino, antaŭindustria kamparanino, konvinkis min, kiam mi estis infano, ke estas pli bone diri la veron ol mensogi. Verŝajne same agis la patrino de Sam GREEN. Tamen estas granda diferenco inter Sam kaj mi. Li kapablas diri la veron bele. Li kapablas artisme prezenti aferojn, kiuj tuj iĝas tedaj, se mi provas klarigi ilin per punktoj kaj subpunktoj. Pro tio la filmo *The Universal Language* prezentas la veron pri Esperanto en tre alloga maniero. “Ŝajnas vera filmo” estis unu el la admiraj komentoj kiujn mi aŭdis de tempo al tempo.

Pri la enhavo mi ne havas plendojn. Tia estas la Esperanto-mondo, plena je japanaj ĵonglistoj, ridetantaj gejunuloj, strangetaj maljunuloj, hungaroj loĝantaj en Japanujo kaj svedoj kun tro longa barbo, ktp. Apud ĉi tiuj iom pli filmecaj partoj estas eĉ tro seriozaj kontribuoj de tre konataj esperantistoj, Humphrey TONKIN, Arika OKRENT kaj mi mem, kiuj klarigas al ĉiuj la ideajn bazojn de Esperanto kaj de la Esperanto-movado. Krome Sam meritas laŭdojn pro la esploroj, kiuj donis al li la solan ekzistantan filmeton de Zamenhof, kiu klinas sin al la publiko kaj plurajn aliajn ĉarmajn historiajn dokumentojn. La ĉapelo de Klara ZAMENHOF konkurencas kun la ĉapeloj de aliaj virinoj, kiuj partoprenis la marŝan procesion en la 30-aj jaroj en Stokholmo dum la tiama Universala Kongreso.

Aliflanke, verkante recenzon pri la filmo, mi sentas la bezonon respondi al la kritikoj, kiujn mi aŭdis en pluraj lokoj: “Mi neniam montros tian defetisman filmon!”, “Oni ne rajtas prezenti nin kiel klaŭnojn. Ni estas tre seriozaj okupiĝantoj pri lingvaj rajtoj!”

Sur kio baziĝas tiuj malpozitivaj komentoj? Unuflanke homoj ne konscias pri kiom ili estas ridindaj, ĝis kiam ili vidas sin en filmo. Sed la satiro

de Sam neniam estas malbonintenca, kaj kiel mi jam rimarkis, ĝi prezentas nin kiel ni estas kaj kun iom da simpatio, neniam kun la malica ĝuo detruiri la rolantojn en la filmo.

Duaflanke, mi kredas, ke homoj atendis ion mensogan kiel propagandecan televidan filmeton. Do, reklamistoj havis patrinojn, kiuj ne tiom transdonis al ili la virton de la vero. Pro tio, reklamaj filmoj asertas aferojn, kiujn ĉiuj sanmensaj homoj ne povas kredi: “Trinku tion, kaj vi iĝos bela!”, “Aĉetu tiun aŭtomobilon, kaj vi baldaŭ iĝos potenca kaj feliĉa!”. Simple ni al kutimiĝis al tio, ke varbaj paroladoj devas esti mensogaj almenaŭ parte. Bone ekipitaj per reklamaj lertoj, multaj esperantistoj ne hezitas anonci, ke “Esperanton oni lernas sen peno en du tagoj!”, ke “La milito-problemoj ĉie en la mondo solviĝus, se UN disvastigus Esperanton al ĉiuj lernejoj de la mondo!”, ke “Esperanto estas la lingvo de paco kaj evoluo! Kial oni ne lernas ĝin en Afriko, por solvi siajn problemojn?” ktp.

Simple kelkaj esperantistoj ne povas percepti la apenaŭajn ridetojn en la anguloj de la buŝo de la homoj, al kiuj ili parolas, kaj kiuj restas skeptikaj je tiaj asertoj, kiel mi antaŭ la promeso, ke mi iĝos bela, se mi aĉetos difinitan trinkaĵon.

Mi vere opinias, ke la filmo *The Universal Language* povas konvinki homojn lerni Esperanton pli ol aliaj varbaj materialoj, kiujn ni produktis kaj produktas. Ĝi estas realisma (ekzemple pri la rolo de la angla lingvo) sed puŝas homojn aliĝi al la “plibonigantoj de la mondo pro la plezuro plibonigi la mondon”.

Mi ankaŭ povas kompreni la korporemon de la esperantistoj antaŭ la malgaja realaĵo de la nederlanda insulo, en kiu en la 30-aj jaroj estis pli da parolantoj ol nun. Oni ne volus eĉ en sonĝo vidi la scenon de la esperantisto, kiu refaldas sian flagon kaj diras “La angla venkis!” Sed tio estas la realaĵo de Nederlando, kaj kontraŭ tio estas amaso da junaj homoj en la filmo, kiuj parolas pri la estonteco. Kaj kion diri pri la firma opinio de la maljuna Baldur RAGNARSON: “Mi mem ne vidos la venkon de

Esperanto, sed ĝi certe venkos!”

Eble estus aldoninta pozitivan noton al la filmo la ĉeesto de afrika klaso de tre junaj lernantoj de Esperanto. Tiaj klasoj oftas en Afriko. Same oni estus povinta aldoni iom pli da komputilmaniuloj, kiuj komputilumas en Esperanto. La reto, unu el la lastatempaj faktoroj de la renesanco de Esperanto, ne ĉeestas en la filmo, tiom kiom ĝi povus ĉeesti.

Malgraŭ tio, mia juĝo estas daŭre tre pozitiva. Temas pri la sola serioza filmo pri la fenomeno Esperanto, vera kaj konvinka. La subtitoloj en deko da naciaj lingvoj certe igas ĝin taŭga por utiligado en kunvenoj

kaj komunikiloj tra la mondo. Ĝi konvinkas homojn pri la valoroj de Esperanto kaj ne tedas ilin.

THE UNIVERSAL LANGUAGE

Sam GREEN

25-minuta dokumentfilmo (en la angla) pri Esperanto, fare de reĝisoro Sam GREEN, kiu interjavis parolantojn ĉe lastatempaj Universalaj Kongresoj. Ĉi tiu estas la dua el du filmoj – la unua, *Utopia in Four Movements*, debutis ĉe la festivalo *Sundance* kaj ricevis tre bonan reagon. DVD. 28:30 min. 190x140. 2011. Usono. **\$25.50.** (ligilo) [<http://goo.gl/3Detg>]



Mia malkovro de Japanujo (*kvina parto*)

Jenja AMIS

Jen la kvina parto de la aventuroj de Jenja en Japanujo.
La kvara parto aperis en n-ro 2013:2.

Obama (ne tiu, alia !)

Ni eksciis pri japana 30-mil-persona urbeto Obama ĝuste kiam Barack OBAMA elektiĝis kiel prezidento la unuan fojon, en 2008: oni montris televide infanojn de la urbo Obama ĝojegi, ke la persono, kiu dividas la nomon kun ilia urbeto, elektiĝis kiel prezidento. Kompreneble, la urbeto ne estis nomita honore al la usona prezidento – la vorto *obama* en la japana signifas “eta plaĝo”.



S-ro Nakajima apud la tre-etaĝa pagodo de Mjocu-ĵi-temple.

Ĉefbonzo salutas nin... Esperante !

De Kioto ni trajnas norden, trans la alta montoĉeno, rekte al la Japana maro. La urbo Obama situas apud

la maro, en la regiono Hokuriku. Kvankam malgranda, la urbo estas tre riĉa je historio je kulturo. Nia unua halto estas Mjocu-ĵi-temple, kies trietaĝa pagodo, kiu staras jam ekde 1270, estas listigita kiel Japana Nacia Trezoro. La vizito al tiu ĉi trankvila loko por ni estas aparte speciala, ĉar ĝia ĉefbonzo, s-ro Nakajima, venis por saluti nin... Esperante! Fakte, li estas lernanto de nia gvidanto en Obama-regiono, s-ro Katagaŭa, kaj li tre diligentas pri la lernado.

Manĝinte la bongustan kaj tre sanan specialaĵon de Obama – *oroŝi-soba* (nudeloj el fagopiro kun raspita rafano), ni zigzagas tra la montaraj vojoj por vidi la Obama-golfon. El la fenestro ni rimarkas la buston de Obama (ĉi-foje, la prezidento!): ĝi staras apud la vendaŭtomato sur kiu estas skribite “I ♥ Obama”. La skulptaĵo staras apud hotelo, kies posedanto estas granda ŝatanto de s-ro Obama, klarigas nia bonkora ĉiĉerono.

Montoj, maro... atomcentralo

La vido de la montoj al la plaĝo estas vere spirprena. Bedaŭrinde, malantaŭ kelkaj el tiaj belaj montoj kaŝiĝas io, pri kio la lokaj politikistoj eble ne tre ŝatas paroli: atomcentralo... “Tre danĝera loko por atomcentraloj, pro la tertremoj kaj la proksimeco al la maro”, diras nia ĉiĉerono. Multaj lokanoj – inkluzive la jam konatan s-ron Nakajima – estas engaĝitaj en la movado kontraŭ atoma energio, kaj ilia voĉo multe plifortiĝis post la tragedio en Fukuŝima. Fakte, unu el la konstatoj de mia edzo Joel, kiu loĝis en Japanujo antaŭ dek jaroj, estis ke Japanoj fariĝis multe pli ŝparemaj pri la uzo de energio: se antaŭe ĉiuj lampoj lumis en la trajnoj, nun nur duono estas lumigitaj, kaj oni multe malpli klimatizas en publikaj lokoj. La katastrofo en Fukuŝima ja konsciigis la japanojn pri la neceso fariĝi pli ŝparemaj pri elektro. (Mi nur povus imagi, kia estus reago de japanoj se mi dirus, ke en mia laborejo en Atlanto oni klimatizis la laborejon ĝis tiu grado, ke nemalmultaj koleginoj uzis portebajn hejtilojn por varmiĝi!) En Kioto ni eĉ vidis manifestacion por plena nuligo de atoma energio,

kaj esperantistoj, eksciinte, ke mi naskiĝis proksime al Ĉernobil, multe demandadis pri la akcidento kaj ĝiaj sekvoj.

De Obama ni veturas al la ĉefurbo de la prefektejo – urbo Fukui, preterpasante multajn tunelojn – ni ja estas en la montaro. Antaŭ la milito, Fukui estis konata pro sia silka industrio – sed nuntempe malmultaj japanoj portas silkajn kimonojn, kaj pro tio la industrio ŝrumpis. Ni renkontiĝas kun la E-grupo de s-ro Kitagaŭa en la bela Internacia Centro. La plejparto de liaj lernantoj estas komencantoj, kaj ili vigle interesiĝas pri ni kaj la vivo en Kanado, kaj eĉ prezentas al ni bonvenigan novaĵleteron, preparitan speciale por tiu ĉi okazo.

Ses homoj, ses katoj, du hundoj kaj kelkdek kokoj

Por tranokto ni veturas al profunda kamparo. Tie, en la montoj, situas terkultivista komunumo Hoeiĝuku – kiu tre favoras al Esperanto kaj kun kiu amikas s-ro Kitagaŭa. Unu el la membroj de la komunumo, s-ino Ŝima, bonvenigas nin en Esperanto kaj informas, ke en tiu ĉi loko loĝas ses personoj, ses katoj, du hundoj kaj kelkdek kokoj. Neniu el la personoj estas parencoj, kaj ili ne apartenas al iu ajn religio: simple unu tagon ili decidis loĝi kune en la kamparo kaj kultivi la teron. Kvin el ses membroj estas sufiĉe aĝaj (inter 50+ kaj 70+), sed antaŭ kelkaj jaroj al Hoeiĝuku aliĝis plia membro: 12-jaraĝa Ai-ĉan, kiu nun estas 15-jara ĉarma kaj timida sunbruniĝinta junulino. La historio de tiu ĉi komunumo eble meritas tutan libron, sed jen mallonga versio.

Ĉio komenciĝis antaŭ ĉ. 30 jaroj, kiam s-ro Tanizaki, kiu havis sian propran universitat-preparan lernejon, kie li mem instruis la anglan kaj matematikon, ekhavis la dubojn, ĉu tio, kion li faras, estas bona en la pli granda senco. Lia respondo al tiu lia propra demando estis nea, kaj tiel li decidis anstataŭ la anglan instrui Esperanton. Kompreneble, li tuj perdis multajn siajn lernantojn... Poste li decidis fari eĉ pli drastan paŝon – kun siaj amiko el Tokio, kelkaj iamaj lernantoj, li decidis translokiĝi al kamparo, por ĝui la vivon en la naturo, sanajn manĝaĵojn kaj por instrui pri tio al aliaj. Ili do aĉetis domon kun terpeco, kaj kun la tempo konstruis pli grandan domon (la strukturon faris profesiaj konstruistoj, sed ili mem faris ĉion alian:

murojn, plankon, ili rakontas fiere). Oni decidis nomi la komunumon Hoeiĝuku, kiu en loza traduko signifas “kreskigi la saĝon”.



S-ro Tanizaki montras al ni lignan libelon.

Kiel la urbanoj fariĝis terkultivistoj

Ĉiuj anoj de la komunumo estis tokianoj, kiuj neniam antaŭe kultivis la teron: ili lernis tion legante librojn kaj parolante kun maljunaj kamparanoj. S-ino Ŝima rakontas, ke ŝiaj gepatroj estis tre skeptikaj pri tiu ĉi decido. Urbanino, laboranta kiel teksisto kaj kuiristo (ĉar unu laboro ne sufiĉis por vivteni sin), ŝi neniam antaŭe kreskigis legomojn. Nun ŝi tute ne imagas reveni al la urba vivo: “Mi ofte devas iri al Tokio por viziti mian maljunan patrinon, kaj mi ne povas imagi loĝi en tiu urbo, kie ĉio tiom malbongustas”, ŝi diras. (Kurante antaŭen, mi devas diri, ke mi kaj mia edzo ja tute ŝatis la manĝaĵojn en Tokio, sed mi tamen rimarkis, kiom elĉerpitaj estas multaj Tokianoj: veturante ĉirkaŭ la oka vespere en la metroo, ni vidis multajn homojn dormi... starante!)

Sed kio pri la juna Ai-ĉan? Ankaŭ ŝi havas rimarkindan historion. Unu konato portis ŝin al Hoeiĝuku simple por montri la komunumon. Fakte, grupoj da junuloj tre ofte vizitas tiun lokon por lerni pri terkultivado kaj lignoprilaborado (pri kio

okupiĝas s-ro Tanizaki). La 12-jarulino estis tiom impresita, ke, reveninte hejmen, ŝi simple rifuzis iri al lernejo – ŝi volis loĝi en Hoeiĝuku. Bonŝance por ŝi, la gepatroj ne povis kontraŭi, kaj do ekde tiam ŝi estas plenrajta ano de la komunumo. Ŝia laboro estas zorgi pri la kokoj, ŝi diras kun fiero. Ai-ĉan tre ŝatas labori kun bestoj kaj volas iri al norda Japanujo – Hokkajdo – por lerni bov-bredadon. Malsame al siaj samaĝanoj, ŝi ne iras al la lernejo. “Sed ĉu Ai-ĉan flue legas?” mi demandas al s-ino Ŝima, kiam Ai-ĉan ne estis en la ĉambro. Ja estas pluraj miloj da ideogramoj por legi librojn kaj ĵurnalojn! S-ino Ŝima ridetas kaj respondas jese: Ai-ĉan estas tre inteligenta kaj avida leganto. Fakte, ŝi sukcesas legi unu libron ĉiutage, kaj tiun saman tagon s-ino Ŝima devis veturigi la knabinon al sia plej ŝatata loko: la biblioteko de Fukui. Ai-ĉan ĉiutage mem lernas ideogramojn kaj ekzerciĝas pri la skribado, kaj vintre, kiam estas malpli da laboro, s-ro Tanizake instruas al ŝi matematikon.

Ĉiutage unu persono el la komunumo estas kuiristo – same Ai-ĉan foje estas la kuiristo de la tago. Mi demandas al la knabino, ĉu ŝi ŝatas kuiri – kaj ŝia vizaĝo tute lumiĝas: jes, kompreneble! Ĉiuj anoj de Hoeiĝuku ŝategas kuiri kaj estas tre lertaj pri tio. Mi demandas s-inon Ŝima (ŝi kuiris tute nekredblan matenmanĝon, konsistantan el eble deko da pladoj), kiu estas la plej bona kuiristo en la komunumo, kaj ŝi respondas ridante: “S-ro Tanizake, kompreneble! Li faras la plej bongustan suŝion en la mondo!”

Veni... vidi... resti !

La juna Ai-ĉan ne estas la sola persono, kiu estis impresita de Hoeiĝuku ĝis tiu grado, ke ŝi decidis resti. Dum la vespermanĝo nin vizitas alia junulino – bela kaj fortika 26-jara Juri, originale el Nagoja. Kvankam Hoeiĝuku ne estas profesia tranoktejo aŭ manĝejo, de tempo al tempo venas vizitantoj, al kiuj oni ofertas manĝaĵojn kaj tranokton (normale oni pagas modestan sumon, sed ili ne akceptis monon de ni). En la komunumo mem ne estas konekto al Interreto, tamen vizitantoj lasas bonegajn recenzojn en la reto, kio portas aliajn vizitantojn. Do, ĝuste tio okazis pri Juri-ĉan: antaŭ iom da tempo ŝi vidis foton de belega plado el kokaĵo kaj venis por gustumi ĝin. Ŝi do amikiĝis kun la komunumo kaj decidis resti ĉi tie: ŝi aĉetis domon kun terpeco en la proksimeco kaj ofte venas manĝi kun la anoj de Hoeiĝuku. Nur poste, kiam ŝi vidis, kiel oni mortigas

la kokojn en la vera vivo, ŝi estis ŝokita. “Sed la manĝaĵo estas tiom nekredble bongusta!” ŝi aldonas kun kulpa rideto.

La tea ĉambro odoras je herbo, kiu sekiĝas pendigita de sur la tegmento (“estas preskaŭ neniu malsano, kiun ne povas kuraci tiu ĉi herbo”, diras s-ino Ŝima). Ni babilas trinkante fortan britan teon kun la bongustega ŝifon-kuko, preparitan por la kafejo, kiu funkcias sabaton kaj dimanĉon (pro multaj vizitantoj, ili devis oficialigi la tagojn, kiam eblas veni por manĝi en Hoeiĝuku). Ĉiuj anoj de la komunumo estas ridemaj kaj spontaneaj, kaj aspektas tute malstreĉitaj. Laborante tiom forte – terkultivado, konservaĵoj, ligno, kafejo, bestoj – kaj sen ferioj (“la bestoj ja ne ferias, ĉu?”, rimarkas s-ino Ŝima), ili fieras, ke ili tamen povas ĉiumatene tiel sidi, senhaste, kaj simple ĝui la babiladon. Tiu komunumo, ŝajne, tute redifinis la signifon de riĉeco – ili estas riĉaj kune... Vintre, kiam estas malpli da agrikultura laboro, ili havas eĉ pli da tempo por babili kaj legi librojn, rigardante el la fenestro la neĝon fali... Ni tranoktas en granda kampara centjara domo, kiun la komunumo ĵus aĉetis por gastigi la parencojn aŭ vizitantojn, kiel nin. Nek en tiu ĉi domo, nek en alia domo, oni ne ŝlosas la pordojn. La unuan fojon en multaj jaroj mi vidas tiom da steloj kaj endormiĝas kun la trankviligaj sonoj de la montara rivereto. Neniu surprizo, ke, la urbanoj, ili tamen translokiĝis ĉi tien!

Reveninte de Obama al Kioto, ni iras rekte al la E-kunveno. Bedaŭrinde, oni devis prokrasti ĝin iomete, ĉar (tiom embarase!), ni prenis malĝustan trajnon... Nia bonega ĉiĉerono el Obama intencis pagi la bileton por simple eniri kun ni en la stacidomon kaj certigi, ke ni ne maltrafas nian trajnon, sed ni konvinkis lin, ke tio ne necesas: “Ni scias la tempon kaj la kajon, do, tute neniel eblas erari!” Bedaŭrinde, ja eblas, se temas pri ni! “Ŝajnas ke la trajno foriris kelkajn minutojn pli frue – ege stranga afero”, diras mia edzo nerveze. Ve! La trajno foriris ĝustatempe, sed estis ni, kiu eniris en la pli fruan trajnon! Ja en Japanujo, kie la trajnoj venas tiom ofte, diferenco de du minutoj ege gravas... Bonŝance, la sekva trajno venas nur post duonhoro, kaj finfine ni alvenas al Esperanto-domo, kie okazas la kunsidoj. “Esperanto-domo” estas, fakte, la oficiala nomo de tiu bela trietaĝa konstruaĵo, konstruigita de unu el la membroj de la E-grupo de

Kioto, s-ino Ajkaŭa.

En la serĉo de kimono

Dum nia tuta trisemajna vojaĝo ni preskaŭ ne havis tempon aĉetumi, sed tamen estis unu afero, sen kiu mi ne volis reveni de Japanujo: kompreneble, la kimono! Se vi ne havas kelkajn milojn da dolaroj por nova kimono, jen bona okazo aĉeti ĝin por nur kelkdek dolaroj (kvankam, uzitan) en la pul-bazaro apud la templo To-ĵi en Kioto, kiun rekomendis al ni nia kiota gastigantino, s-ino Tahira. La bazaro funkcias nur la 21-an tagon de la monato – en tiu speciala tago ĉiuj povas senpage viziti la templon, apud kiu staras la plej alta ligna konstruaĵo en la tuta Japanujo: preskaŭ 55 metrojn alta pagodo! Krom uzitaj kimonoj, tradiciaj ŝuoj kaj ceteraj vestaĵoj, vi povas trovi tie... esence, ĉion! La plurcent butikoj vendas ĉiajn brokantaĵojn, artaĵojn, teumaĵojn, bonsaĵojn, manĝaĵojn kaj trinkaĵojn. “Atentu pri via monujo kaj ne kedu la ĉarlataĵojn”, avertas Minoru, la edzo de s-ino Tahira, kiu afable konsentis ĉiĉeroni nin al la bazaro. Post kelkaj horoj da serĉado ni konstatas, ke ni tute ne povas trovi la sufiĉe longan kimonon – eĉ se la nuntempaj junaj japanoj estas preskaŭ samaltaj kiel ni, la malnovaj kimonoj estis faritaj por pli aĝa generacio, kiu estas malpli alta. Post kelkaj horoj da serĉado en 35-grada varmeco ni konstatas, ke ni simple ne kapablas serĉi plu: ĉiuj koloroj kungluiĝas en unu ĉielarkan amason. Malvarma biero en klimatizita kafejo ŝajnas al ni paradizo.

Kiel mi fariĝas japanino

Sekvatage, en la kompanio de s-ino Tahira, ni kompletigas nian kimonan edukadon vizitante la centron pri teksado en la historia kvartalo Niŝiĝin, mondfama pro sia teksa metio kun impresa pli ol mil-jara historio. Tie oni montras la fajnajn artojn de ĉio ligita al kimonoj: teksado, farbado, plektado de zon-ŝnuro (kiel mi eksciis poste, eĉ la faldado de kimono estas scienco: preskaŭ kiel origamio!). Oni eĉ povas mem provi kelkajn metiojn, kaj mi, sub la gvido de majstro, faras pentraĵon sur la silko. La majstro-farbisto donas al mi la silkaĵon kaj – tute neatendite – donacas sunombrelon! Sunombreloj estas tre gravaj akcesoraĵoj por japaninoj: esence ĉiuj, junaj kaj aĝaj, portas ilin, eĉ surbicikle. Do jen la unua paŝo al mia japaniĝo: mi komencas porti sunombrelon, kiel ĉiuj aliaj virinoj!

Niŝiĝin ankaŭ tre famas pro la demonstrado de kimonoj – oni povas eĉ provi sin en la rolo de modelulino! Ni ekscias, ke estas striktaj reguloj pri la koloroj kaj la stiloj: needziĝintaj junulinoj portas kimonojn kun frapaj koloroj kaj desegnaĵoj, kun longaj manikoj (preskaŭ ĝisplanke). Pli maturaj geedziĝintaj virinoj portas pli subtilajn kolorojn, kaj la manikoj estas mallongaj. (Fakte, oni faras kimonojn tiamaniere, ke oni povas mallongigi la manikojn post la geedziĝo.) Aldone al kimono, oni devas havi plurajn akcesoraĵojn: sandalojn, ŝtrumpoj, plurajn zonojn, mansakon... Foje la akcesoraĵoj kostas same (aŭ pli) ol la kimono mem, sed ne surprize: la mana plektado de unu ŝnuro, kiu iras super la zono, daŭras ĉ. dek horojn, diras al ni la metiistino: profesiuloj kiel ŝi povas fari 15 cm en unu horo! Alia nepra akcesoraĵo estas subkimono, ĉar por ĝuste purigi la kimonon oni devas... tute malkudri ĝin, lavi, sekigi kaj tiam rekudri! Sed ĉar ĝi estas tiom malfacila (aŭ multekosta, se tion faras en profesia servo), oni portu ĝin tre atente kaj prefere... simple ne lavu!

Rigardante tiajn belajn kimonojn, mi tute ne scias, ke vespere, dum la kunveno kun esperantistoj en la kiota E-domo, min atendas grandega surprizo. Ĉar mi volis fotiĝi en japanaj vestaĵoj, membro de la kiota grupo – profesia kantistino, s-ino Noda – speciale por mi portis unu el siaj someraj kimonoj (*jukata*). “Bone, ke mi portis la grandan”, ŝi krias, vidinte min. Tri personoj helpas al mi vestiĝi en belega malhela *jukata* – post dekkvin minutoj da magio, oni ne plu povas rekoni min (jen la dua paŝo al mia japaniĝo)! Mi kun fiero portas ĝin dum la tuta vespero, kaj je la fino de la amuzplena (kaj kantoplena) kunveno, s-ino Noda diras, ke ŝi donacas al mi la *jukata*-n... kaj manfaritajn zonojn, kaj subkimonon kaj ĉion alian! Vere, mi ne povas kredi... tio ja estas la plej luksa donaco iam ajn! Grandegan dankon al vi, denove kaj denove!

La tria paŝo al mia japaniĝo

“Mia edzo estas freneza” – tiel mi notas en la notlibro pri la komenco de la sekva tago. Ankoraŭ antaŭ la vojaĝo li tre volis fari japanstilan geedzigan ceremonion – tamen, pro la ekstrema varmeco li forlasis tiun ideon, sed tamen li ne forlasis la ideon fotiĝi en tradiciaj japanaj geedziĝaj vestaĵoj. La kosto de la vestado, ŝminkado kaj unu foto estas tute akceptebla, kaj do matene ni iras al la fotejo. Oni

ŝminkas min dum preskaŭ horo, kaj vestas dum plia duonhoro: kompanse oni striktigas mian bruston por kaŭĉuka rubando (la brusto devas esti nerimarkebla en tradiciaj japanaj vestaĵoj), kaj poste surmetas kvar tavolojn da kimonoj, kaj plurajn zonojn kaj ornamaĵojn.



Meze de la detalaj preparoj.


Fine, oni kronas min per belega (sed ekstreme peza) peruko, kaj kiam mi finfine rigardas en la spegulo, mi vere ne plu povas rekoni min. “Vi aspektas kiel japana pupo”, diras la stilistino, kiu ŝajne mem ne atendis tian rezulton!

Mi estas tute ravita! Tamen, mi preskaŭ ne povas spiri kaj malfacile staras rekte, sub la pezeco de la peruko: mi ne povas imagi, kiel iu ajn povas travivi tradician japanan geedziĝon en neklimatizita ejo. Kiel poste rakontas al ni s-ino Tahira, unu ŝia konatino svenis dum geedziĝo, pro la varmeco kaj la peruko. Mi envias al Joel, kies tuta vestado daŭris nur dek minutojn, kaj mi kompatas la nobelulinojn de antaŭ mil jaroj, kiuj devis porti 12 tavolojn da kimonoj, kaj same majkojn kaj geĵsojn, kiuj, malgraŭ la peruka suferado, devas ankaŭ muziki kaj danci!

Mi esperas, ke oni rapide faros tiun unu foton, por kiu mi devas tiom suferi – sed oni faras centon! Mia kapo doloregas. Finfine, oni forprenas la perukon – jen venas fino de la torturoj. Sed ne! Jen komenciĝas la vera torturo: nun ni devas elekti la foton. *La* foton, ĉar ĉiu aldona foto venas kun aldona kosto! Tiom suferi por nur unu foto?! Nu, kun iom da negoco, ni tamen aĉetas la plejparton da ili, eĉ se tio kostas *muulte* pli ol ni planis. Nun vi komprenas, kial mia edzo estas “freneza”!



(daŭrigota...)



Jenja AMIS


Naskita en Kievo, Jenja pasigis kvin jarojn en Atlanto kaj nun loĝas en Montrealo. Ŝi dum jaroj redaktis la revuon *Kontakto*, kaj nun ŝi laboras por la fonduso *Esperantic Studies Foundation*.

<yevgeniya.amis@gmail.com>

Pri diferencialaj ekvacioj

Barry FRIEDMAN

Diferencialaj ekvacioj estas matematika lingvo en kiu la naturo esprimas siajn leĝojn. La ekvacioj priskribas interrilaton pri momenta rapideco de ŝanĝiĝo de unu variablo rilate al alia variablo. Kompreno de diferencialaj ekvacioj estas necesa en la plimulto de sciencoj kaj inĝenierartoj.



Ekzistas multaj realvivaj aplikoj de diferencialaj ekvacioj. Ekzemple en biologio, diferencialaj ekvacioj povas priskribi la rilaton inter predantoj kaj predatoj en ekosistemo, kaj la konsekvencojn de troloĝateco kaj maltroloĝateco. Medicina scienco uzas diferencialajn ekvaciojn por determini la rapidecon de kresko de tumoroj. En inĝenierarto, diferencialaj ekvacioj priskribas kiel elektraj fluoj moviĝas tra cirkvitoj. En kemio, ili priskribas la rapidecon de kemiaj reagoj. Ekonomikistoj uzas diferencialajn ekvaciojn por priskribi profitojn de investoj kaj ekvilibron kaj stabilecon en ekonomiaj merkatoj. En fiziko, la Dua Leĝo de Newton estas diferenciala ekvacio, kaj la Kampaj Ekvacioj de Einstein, kiuj priskribas lian Ĝeneralan Teorion de Relativeco, ankaŭ dependas de diferencialaj ekvacioj. Krome, kiam fizikistoj priskribas ondojn de lumo, sono, aŭ akvo, ili uzas diferencialajn ekvaciojn.

Jen ekzemplo de la uzo de diferenciala ekvacio — la forpaso de radioaktiva substanco:

$$dN/dt = \lambda N$$

kie λ (lambdo) estas pozitiva konstanto, N estas la kvanto de la substanco, kaj t estas tempo. Rimarku, ke dN/dt estas derivaĵo. La ekvacio signifas, ke la rapideco de la forpaso rekte rilatas al la kvanto de la substanco.

Oni povas rearanĝi la ekvacion por meti la N -ojn en la saman flankon de la ekvacio:

$$dN/N = \lambda dt$$

kaj nun oni povas uzi integralan kalkulon por trovi la solvon:

$$N = N_0^{-\lambda t}$$

kie N_0 estas la kvanto de la substanco je la komenco.

Jen praktika apliko de la ekvacio: Radioaktiva izotopo havas duoniĝan tempon de 16 tagoj. Oni volas havi 30 gramojn post 30 tagoj. Kiom oni havu komence?

Por solvi, unue trovu la valoron de lambdo. Oni povas trovi ĝin ĉar, pro la difino de duoniĝa tempo, $N = N_0/2$ post 16 tagoj. t do estas 16 tagoj, N (fina kvanto) estas 1 gramo, kaj N_0 (komenca kvanto) estas 2 gramoj. Metu tiujn numerojn en la ekvacion kaj kalkulu la valoron de lambdo.

Kiam oni jam scias la valoron de lambdo, oni uzas la ekvacion kun $t = 30$ tagoj kaj $N = 30$ gramoj por kalkuli la valoron de N_0 . La solvo estas 110 gramoj.

Sen diferencialaj ekvacioj, socio ne estus povinta antaŭeniri por krei modernan vivon. La ideoj, sur kiuj baziĝas la ekvacioj, unue ekvidiĝis jam dum la 1630-aj jaroj en Eŭropo. Kaj egale kun diferencialaj ekvacioj, nuntempa socio havas fortan ilon por daŭrigi tian progreson.



Barry FRIEDMAN

Barry estas esperantisto jam de preskaŭ 20 jaroj. Li ŝatas basbalon, lingvojn, kaj manĝi pasto-ringojn.

<bfriedma@chemistry.ohio-state.edu>

Nenian ideon

Joshua MORRIS

En Usono, se oni ne estas kvin minutojn frua, oni jam malfruas kvin minutojn. En Kameruno, se oni estas kvin minutojn malfrua, oni ankoraŭ fruas almenaŭ unu horon. Kameruno ja ruliĝas per “Afrika Tempo.” Horaroj estas malofte respektataj. Kiam komenciĝos kunveno? Oni hezitas konjekti. Ĉu la interurba aŭtobuso haltos unu fojon aŭ dudek? Oni neniam povas scii. Do, jen grava afero, kion mi eksciis frue ĉi tie:

Ĉiam alportu libron.

Mi enŝuiĝis por iri al la unua administra kunveno de la jaro ĉe mia lernejo. Malgraŭ tio, ke jam pasis tridek minutoj post la planita komenco-horo, mi sciis, ke mi estos ankoraŭ tro frua. Do mi kunportis libron de krucvortenigmoj kaj ekmarŝis supren al la kota monteto kie sidas la lernejo. Alveninte, mi sidiĝis en la malantaŭa flanko de la instruisto-salono kaj komencis atendadi.

Hm, hm, hm. Vespo traflugis la ĉambron.

Do, do, do, do, do... Kurbdorsa sekretario vagis tra la konstruaĵo sencele.

Sur la verando, la lernejestro kriis komike laŭte en sian poŝtelefonon. Studantoj en- kaj eliris, murmurante salutojn. Mi klakigis skribilon kaj eksolvis la unuan krucvortenigmon...

Finfine ĉiuj, kiuj estis alvenontaj, estis alvenintaj. La lernejestro stariĝis. Lia surtuto estis iom tro granda, kaj la manikoj pendis ĝis liaj fingroartikoj, donante al li aspekton de granda bebo en kostumo. Li gestis, por ke la bruo ĉesu. “Bonvenon al ĉiuj”, li elgorĝigis tra premitaj dentoj. “Mi tre ĝojas revidi viajn brilajn vizaĝojn denove dum ni komencas la novan lernojaron ĉe Registara Gimnazio de Ewoh. Mi esperas, ke viaj ferioj estis tute kiel lito de rozoj.”

Mi levis mian rigardon supren de mia enigmo kaj frandis la kuriozan esprimon.

“Pro tio, ke ni havas kelkajn novajn kolegojn ĉi-jare,

mi volus, ke ĉiuj sin prezentu.” Li diris sian nomon kaj daŭrigis: “Mi estas la lernejestro de la Registara Gimnazio de Ewoh, kaj la pordo estas fermita.”

Sekve la vicestro stariĝis kaj sin prezentis: “Mi ’stas l’ vicestro, mi’ pordo ’stas ankaŭ fermita.” Liaj lipoj dishakis la vortojn en preskaŭ nerezoneblajn pecojn. Li havis seriozan vizaĝon kaj okulojn kiuj ŝajnis kredi eĉ ne unu vorton, kiun oni diras.

Tiamaniere daŭris la prezentado. Unu instruistino, kaprobarba kaj ĉevaldenta, havis malfermitan pordon. Alia instruisto, kromnomita “s-ro ‘Senprobleme’”, havis antaŭan pordon fermitan, sed malantaŭan larĝe malfermitan. Unuope la instruistoj malkovris siajn nomojn kaj pordajn aranĝojn.

Pasintjare, je mia vico, mi leviĝis kaj anoncis, “Mia nomo estas Joshua, mi estas ano de la Usona Pac-Korpuso, kaj mi scias nenion pri miaj pordoj.”

Ĉiuj ekridis.

La lernejestro plektis siajn fingrojn, klinetis sian kapon petoleme, kaj demandis, “Nu, ĉu vi jam edziĝis?”

“Ne”, mi respondis.

“Do, s-ro Morris havas pordon malfermitan!”

Mi memoras tiun momenton kiel etan “mi ne plu estas en Kansas”-momenton: Dekomence miaj kolegoj deklaris siajn amrilatajn situaciojn kaj ĉu ili volonte adultus. Sed ĉi-jare, mi eĉ ne palpebrumis pro tio. Mi leviĝis kaj diris, “Mi nomiĝas Joshua, mi estas ano de la Usona Pac-Korpuso, kaj mia pordo ankoraŭ restas malfermita.” Tiam mi residiĝis kaj reinteresiĝis pri mia krucvortenigmo.

La enigmo estis malbona – tia speco kun indiketoj aŭ tro svagaj aŭ tro evidentaj. N-ro 12 vertikale: “Loĝanto de Kanado.” *Kanadano*. N-ro 31 horizontale: “Birdo.” Sep literoj. *Hm... Nenian ideon*.

Mi duone aŭskultis la estron sciigi nin pri la rezultoj

pasintjaraj: “52 elcentoj de niaj ekzamenokandidatoj sukcesis diplomiĝi”, li diris. “Do, mi gratulas vin pro via vigla laboro.”

Eble oni sin demandus, ĉu vere indas gratuli pro tia rezulto. Kaj antaŭ dudek monatoj, ankaŭ mi simile demandus. Sukceso de 52 elcentoj estas alivorte malsukceso de 48 elcentoj, kaj laŭ usonaj normoj, oni hontus pri tio. Sed Kameruno ne estas Usono, kaj usonaj normaj ne normas kamerune. Fakte, nia lernejo havis la plej bonan sukceson-rangon en la distrikto. Mi donis etan aprezan kapjeson.

N-ro 52 horizontale: “Heleno de ___.” *Trojo*.

Estas mirige, mi pensis, al kio oni povas alkitimiĝi.

N-ro 48 vertikale: “Poeto de ampoemoj.” Kvin literoj, komenciĝas per “O”... *Nenian ideon...*

Antaŭ dudek monatoj mi eble ne kredus, ke kiam iu diros al mi “Ŭaŭ! Vi aspektas tre korpulenta!”, mi respondos “Dankon”. Mi eble ne kredus, ke la unua frazo el mia buŝo post mortigo de serpento estos, “Ĉu ĝi sufiĉe grandas por manĝi?” Sendube mi ne plu estas la sama viro kiu mi estis, kiam mi foriris. Ĉu pli bona? Ĉu malpli bona? Pli bone ne demandi.

Mi levis la kapon. La lernejestro estis finanta ŝercon pri inaj generiloj: “Do mi mansignis al ŝi kaj kriis ‘Tiel larĝa!’”

S-ro Senprobleme ridis kaj kriis “Senprobleme!”

Mi ridegis.

Sekve la estro falis en diskuton pri respondecaj labor-principoj. Li memorigis nin, ke ni instruistoj devas veni al la lernejo ĉiun semajnon, por vere instrui.

N-ro 4 horizontale: “Afrika Antilopo.” *Gnuo*.

Kaj kiam ni estas ĉe lernejo, ne ĝustas sidi en la instruisto-salono kaj devigi la klasestron kopii niajn prelegojn sur la nigran tabulon.

N-ro 10 vertikale: “Ĉefurbo de Ligurujo.” *Nenian ideon...*

Li plendis pri praaj ŝuldoj al la Instruista Socia Komitato (ŝajnis ke iu sinjorino ne pagis al la Komitato por la monato de Aprilo, 2008).

Post tiom da similaj evidentaĵoj kaj neniaĵoj, mi enuegis kaj tre sopiris “punkton dek unu.” Punkto Dek Unu estas la sola bona parto de kameruna kunveno. Ĝi konsistas el grandaj teleroj de manĝaĵo kaj grandaj boteloj de bieroj.

“Kaj fine, la administrantaro volus memorigi vin, ke ni ĉiuj devas konsili al la studentinoj ne amori por mono, ĉar tio estas prostituado. Nu! Laŭ la aspektoj de viaj vizaĝoj, kiuj ne plu tiom brilas, kiom je la komenco, mi opinias, ke ni devas fermi nian kunvenon.”

Mia koro saltis espere. Jen punkto dek unu! Jen la fino!

“S-ro G., mi vin petas, gvidu nin en preĝo.”

Mi senespere suspiris. S-ro G. konsideras sin kiel pastoron, do liaj preĝoj ĉiam longdaŭras.

“Ni ĉiuj stariĝu”, li petis.

Mi kontraŭvole demetis miajn enigmojn.

“Nia Patro, Vi estas la Alfa kaj Omega, la Komenco kaj la Fino, la Antikvo de Tagoj, Vi estas bona, Vi estas amo. Jehovo, ni gloras Vian fortan nomon. Estas dirite, ke kie ajn du homoj kunvenas en Via nomo, tie Vi ĉeestos, do ni scias, ke Vi estas inter ni hodiaŭ dum ni fermas la unuan kunvenon de la lernoĵaro. Ni petas, benu nian tempon, benu nian diskutadon, benu la manĝon kaj la manojn, kiuj ĝin preparis, ni petas per la fortega nomo de Jesuo!”

“Amen!” ĉiuj ekkriis.

“Patro”, li rekomencis, “nia fido povas transloki montojn. Ni fidas do, ke la jaro bone disvolviĝos, ni fidas, ke ni instruos tiel, kiel la studentoj komprenos, ni fidas, ke ĉio, kion ni entreprenos ĉiam sukcesigos! Sinjoro, sukceso estu nia porcio! Ni fidas tion ĉi en la fortega nomo de Jesuo!”

“Amen!” ĉiuj ekkriis.

“Dio mia...” mi murmuris subvoĉe.

“Patro”, li re-rekomencis, “ni preĝas, ke la okuloj de la blinduloj malfermiĝu, ke la oreloj de la surduloj ekaŭdu, ke la membroj de la lamuloj refortiĝu, en la fortega nomo de Jesuo!”

“Amen!” ĉiuj ekkriis.

...ke la pulmoj de la babilemuloj malpleniĝu! mi pensis.

“Ĉiela Patro”, li re-re-rekomencis, “Vi estas tiom bonega. Vi scias ĉion. Al Vi nenio maleblas. Antaŭ Vi ĉiu homo sin klinas. Ĉiu lango konfesas, ke Vi estas la Sinjoro de sinjoroj. Ni tre dankemas pro via kompatemo, pro via graco. Ni dankas vin per la fortega nomo de Jesuo!”

“Amen!” ĉiuj ekkriis.

Bah! mia menso kolerbolis, mi dankemus, nur se ni komencus per punkto dek unu. Tiel mi jam estus iom ebri...Ah!

Ĉi-foje s-ro G. ne rekomencis sian kriadon. Mi viŝis la grimacon de sur mia vizaĝo kaj rimarkis ke la prezidanto de la socia komitato iras alporti la refreŝigaĵojn.

Li baldaŭ revenis kun granda skatolo da diversspecaj kamerunaj bieroj. La plejparto de kamerunaj bieroj estas krudaj kaj ne tre bongustaj, sed normala botelo

estas duoble pli granda ol usona botelo kaj kvinone malpli kosta. Mi elektis specon *Castel*, “La Reĝino de Bieroj.”

“Ĉu mi devas malfermi ĝin nun?” demandis la prezidanto.

“Mi petas, en la fortega nomo de Jesuo!”

La botelo malfermiĝis kun leĝera *pŝt*. Mi fermis la enigmolibron. *Dank’ al dio, la fino de la kunveno, mi pensis. Kaj preskaŭ la fino de mia deĵoro. En kvin monatoj ĝi finiĝos. Ŭaŭ. Kion mi faros kiam mi estos denove hejme? Mi prenis longan gluton de la biero... Nenian ideon.*



Joshua MORRIS

Joshua deĵoras en Kameruno por la usona Pac-Korpuso. Ĉi tie li prezentas siajn proprajn opiniojn kaj ĉiutagajn spertojn (kiuj ne necese reprezentas vidpunktojn de la Pac-Korpuso mem).

<josxuo@gmail.com>

senintenca esperantaĵo?

“Estimulo”



Membro Tim WESTOVER sendis tiun ĉi foton de estimemaj vinboteloj el Argentino. Supozeble ili estimas siajn trinkontojn. Aŭ ĉu ili simple timas la korelativan finaĵon -es?